KVINA PASKA DIMANĈO – 2an de majo 2010

NOVAN ORDONON MI DONAS AL VI, KE VI AMU UNU ALIAN – Komentario al la Evangelio de P. Alberto Maggi OSM

Joh. 13, 31-33a 34- 35

Kiam Judaso eliris [el la manĝosalono] Jesuo diris: Nun la Filo de homo estas glorata, kaj Dio estas glorata en li; kaj Dio gloros lin en Si mem, kaj tuj Li gloros lin.

Infanoj, ankoraŭ mallongan tempon mi estas kun vi. Novan ordonon mi donas al vi, ke vi amu unu alian; kiel mi amis vin, tiel vi ankaŭ amu unu alian.
Per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi havos amon unu al alia.

Ĉe la bazo de la ununura ordono de la kristana komunumo ne estas revelaciita doktrino, sed estas amgesto. Ni aŭskultu la Evangelion laŭ Sankta Johano.

"Kiam li eliris", Judaso eliris, Judaso ne akceptas la senkondiĉan oferon de amo kiun Jesuo daŭre reproponas al li dum la lasta vespermanĝo, kaj li eliras. Kaj la evangeliisto diras: "Kaj estis nokto".

Bildigo de la mallumo, Judaso enprofundiĝis en la mallumon kiu lin englutis. Nu, "Kiam li eliris Jesuo diris "Nun", tiu 'horo' anoncita en la tuta Evangelio, nun realiĝas, "La Filo de homo estas glorata, kaj Dio estas glorata en li"; kia estas la signifo de tiu ĉi esprimo?

Jesuo proponis senkondiĉan amon ankaŭ al la perfidinta disĉiplo; al lia malamo Jesuo daŭre respondis per amo ĝis doni al li tiun panpecon kiu reprezentas Lin mem. Nu, Judaso ĝin rifuzis. Kiam la amo manifestiĝas en senkondiĉa maniero, tie manifestiĝas la gloro de Dio. Kaj Jesuo diras ke "la filo de homo estas glorata", kia estas la signifo de la esprimo "La Filo de homo?

Jesuo estas Filo de Dio kaj Filo de Homo; Filo de Dio, nome Dio kiu montras sian kondiĉon plene homan, Filo de Homo, nome Jesuo montras la homon en la dia kondiĉo; kiam la homo kapablas alveni ĝis la senkondiĉa maniero de amo, tiam en li manifestiĝas la dia kondiĉo.

Kaj Jesuo daŭrigas: "Se Dio estas glorata en li Dio gloros lin en Si mem, kaj tuj Li gloros lin". Jesuo estas antaŭanoncanta kio okazos poste en la momento de la pasiono, kie iom post iom kiam la mallumo plidensiĝos sur Jesuo, tiam la lumo de ilia amo brilos pli ol iam ajn ĝis fariĝi ne eltenebla. Do Jesuo estos la lumo kiu brilas en la mallumo.

Poste – kaj la ununuran fojon aperas tiu ĉi vorto en la Evangelio laŭ Sankta Johano - en tiu drama okazo Jesuo sin turnas al siaj disĉiploj per senfina amsento nomante ilin "Infanoj", laŭlitere 'etuloj'. "Infanoj, ankoraŭ mallongan tempon mi estas kun vi**",** antaŭ mallonga tempo Jesuo estos arestita.

“Vi min serĉos; kaj kiel mi diris al la Judoj: Kien mi iras, tien vi ne povas veni, tiel ankaŭ al vi mi nun diras”.

Kial la disĉiploj ne povas iri kien iras Jesuo? Jesuo iras renkonte al morto. La disĉiploj ne povas iri tien ĉar ili ankoraŭ ne ricevis la Spiriton kiun Jesuo verŝos sur ilin ĉe la kruco kaj en la momento de sia unua apero kiel resurektinta. La disĉiploj pretas doni la vivon por Jesuo, morti por Jesuo, sed ili ne estas pretaj morti kun Li kaj, super ĉio, morti kiel li.

Nu, en tiu embarasa momento, Jesuo transdonas al sia komunumo ĝian ununuran ordonon. **“**Novan ordonon mi donas al vi”, la evangeliisto ne diras ke Jesuo lasas novan ordonon, nome, jam ekzistas la dek ordonoj de Moseo kaj Jesuo aldonas al ili la lian, Jesuo tute ne transdonas novan ordonon, sed li lasas ordonon kiu estas tute nova. Kiel indikite de la greka termino ni povus tion traduki kiel ‘pli bonkvalita’, temas pri pli bona ordono kiu anstataŭas la tutan ceteron.

Temas pri tio kion la evangeliisto jam antaŭdiris en sia Prologo kiam li diras: “la leĝo estis donita per Moseo; la graco kaj la vero estiĝis per Jesuo. Tiam Jesuo donas ordonon, ĉar ĝi ne estas ordono, se Jesuo nomas ĝin tiel tion li faras por ĝin kontraŭmeti al la dek ordonoj de Moseo, ĉar Jesuo ordonas la ununuran aferon kiu ne povas esti ordonata al homo.

Kion oni ne povas ordoni al homo? Oni povas ordoni al li obei, servi, sed oni ne povas ordoni al homo ami.

Kaj jen la ordono: “Ke vi amu unu alian; kiel mi amis vin**”,** Jesuo ne diras “kiel mi amos vin”, li ne celas la kompletan kaj plenan donacon kiu poste manifestiĝos antaŭ ne malmulte da tempo sur la kruco, sed li diras “kiel mi amis vin”. Kaj kiel amis Jesuon? Ĉi tie jen la kunteksto de la lasta vespermanĝo, kiam Jesuo fariĝis donaco por siaj disĉiploj kaj komencis lavi al ili la piedojn puŝante ĝisekstreme sian amkapablon.

Do, temas pri amo kiu montriĝas pere de la servo; do, ne “kiel mi amos vin”, sed “kiel mi amis vin”, nome pere de amo kiu fariĝas videbla per la servo. “Tiel vi ankaŭ amu unu alian.”

La ununura ordono de la kristana komunumo estas amo kiu videble manifestiĝas pere de la servo.
Tiu estas la ununura distingilo por la kredantoj je Jesuo, “Per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj”; la fakto ke oni estas disĉiplo de Jesuo ne vidiĝas pere de distingiloj, vestaĵoj, ornamaĵoj aŭ pere de kiu scias kion, la nura distingilo kiu montras ke oni estas disĉiplo de Jesuo estas la amo kiu transformiĝas en la servon al aliuloj.

Fakte Jesuo diras: “Per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi havos amon unu al alia.”

En tiu ordono Dio, kiu manifestiĝas en Jesuo, ne ensorbas la fortojn de siaj sekvantoj, sed li komunikas al ili la siajn, li diras “kiel mi amis vin”, estas Jesuo kiu komunikas tiun ĉi amon. La Dio de Jesuo ne absorbas la homojn, sed ĝi petas al ili ke ili ĝin akceptu por kunfandiĝi kun ili kaj donaci al ili ĝian amkapablon mem, plivastigante ĝisfunde ilian grandanimecon, ilian donacon, ilian servon kaj ilian sindediĉon.